

Beate (Beata) martyr, prospera

Brevier-Himno

Komunaj tekstoj > unu martiro > horo de la legaĵoj

<i>Beate (Beata) martyr, prospera diem triumphalem tuum, quo sanguinis merces tibi corona vincenti datur.</i>	Feliĉa estu, (martirin') ho martir' en tiu ĉi triumfa tag', en kiu Di' pro via sang' ornamis vin per venko-kron'.
<i>Hic te ex tenebris sæculi, tortore victo et iudice, evexit ad cælum dies Christoque ovantem reddidit.</i>	Ĉi tago el la mond-mallum', el mort-kondamno kaj tortur' vin levis al ĉiela glori', por ke en Krist' jubilu vi.
<i>Nunc angelorum particeps colluces insigni stola, quam testis indomabilis rivis cruoris laveras.</i>	Vi kune kun la anĝelar' brilegas nun en blanka rob' lavita en river' de sang' de vi, fervora atestant'.
<i>Adesto nunc et obsecra, placatus ut Christus suis inclinat aurem prosperam, noxas nec omnes imputet.</i>	Ĉeestu nin. Porpetu, ke orelon Sian klinu Krist' al ni, la Liaj, por prosper', ne punu nin laŭ nia pek'.
<i>Paulisper huc illabere Christi favorem deferens, sensus gravati ut sentiant levamen indulgentiæ.</i>	Vi intervenu en ĉi temp' por ni ĉe Kristo pri favor': Li levu nin el kulpo-prem', indulgon donu Li al ni.
<i>Honor Patri cum Filio et Spiritu Paraclito, qui te corona perpeti cingunt in aula gloriæ.</i>	Honor' al Di', la Patro, nun, la Filo kaj la Paraklet', al Dio, kiu kronis vin eterne en la hal' de l' glori'.
<i>Amen.</i>	Amen.

latina T: Prudentius

E: Albrecht Kronenberger 2008